




1*1993*154

STARTO

ORGANO DE ĈEĤA-ESPERANTO-ASOCIO

78-a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO



VALENCIO 24-31 JULIO 1993

Jak se přihlásit na sjezd ?

Na květnový česko-německý sjezd v Karlových Varech můžete přijet jako delegáti nebo hosté. Delegáti neplatí sjezdový poplatek a dostanou proplaceno jízdné, avšak ubytování a stravu si hradí sami (může jim to proplatit klub). Totéž se týká kandidátů do výboru svazu a čestných členů svazu, kteří mohou (ale nemusí) být současně i delegáty. Ostatní hosté si hradí vše sami. Přihlášku na sjezd všichni dostali ve Startu 6/92.

Sjezdový klíč:

klub do 50 členů 1 delegát
klub nad 50 členů 2 delegáti
sekce 1 delegát

(komise nárok na kandidáta nemají)

Pro stanovení počtu klubových členů je rozhodující počet členských příspěvků zaplacených do do 1.3.1993 (+ doživotní členové).

Důležité upozornění:

Delegáti, kandidáti a čestní členové se musí přihlásit do konce března, jinak si budou všechny náklady hradit sami stejně jako hosté.

Osud Ringa ohrožen

V dětech je budoucnost esperanta, proto náš svaz založil fond Ringo, z něhož je pro děti financován stejnojmenný časopis. V loňském roce vyšla tři čísla, která fond vyčerpala. Apelujeme na naše členy, aby přispěli na fond a časopis Ringo aspoň částkou pomyslného ročního předplatného pro jedno dítě (20 Kčs).

Víte, že se děti mohou stát členy Českého esperantského svazu jako dospělí?

Členský příspěvek pro dětskou kategorii je 30 Kčs ročně, jen poprvé je nutno ještě zaplatit 20 Kčs zápisné.

Nezapomeňte se přihlásit na letní esperantský tábor v Lančově!

první etapa: 4.7. - 17.7.1993
druhá etapa: 18.7.- 31.7.1993
třetí etapa: 1.8. - 14.8.1993

Ceny (Kčs)	do 15.3.	do 15.6.	později
mládež do 18let, a studující	1.500,-	1.600,-	1.700,-
ostatní	1.700,-	1.800,-	1,900,-

EL NIAJ ESPERANTO-SOCIETOJ

JESENÍKY

La 19an de junio 1993 realiĝos jam III-a suprenmarŝo de esperantistoj al Praděd, la plej alta monto de Jeseníky kaj de la tuta Moravio (1492 m). Komuna foriro de esperantistoj kaj de iliaj amikoj je la 9.30 horo el Karlova Studánka de la restoracio Hubertus. Invititaj estos ankaŭ eksterlandaj esperantistoj. Samtempe okazos renkontiĝo de reprezentantoj de moraviaj E-klubo. Por malproksimaj vizitontoj eblas sekurigi tranoktadon (18/19 kaj 19/20 junio) en Karlova Studánka en tranoktejo de la hotelo Opava (prezo proksimume 50,- kronoj/nokto).

Kontaktadreso: Štefan Takáč, Hrdinů 1158, 783 91 Uničov.

BRNO

Esperantista klubo en Brno trovis sufiĉe konvenan klubejon en Spojklub, Šilingrovo nám. 3/4. La klubanoj ĉiumarde vespere ne nur renkontiĝas, sed preparas ankaŭ kulturajn kaj klerigajn programojn (ekz. pri atomelektrejoj, medicinaj plantoj, sponĝoj, planedoj, negraj spiritualoj, ĉeĥa literaturo, Gutenberg, Vrchlický ktp.). En Brno estas preparataj periodaĵoj Starto, Ringo, kluba Bulletin, kaj ankaŭ Jarlibro de ĈEA'92, prelegoj de seminario pri Komenio.

Estis fondita Esperanta Literatura Fondaĵo (ELFo), jam prezentita per la unua eldonaĵo: Doktoro Johano Faŭsto. Pluaj tekstoj estas prilaborataj, ofte dank' al eksteraj kunlaborantoj. Ni dankas al ĉiuj, kiuj kontribuis al la fondaĵo: Josef Vondroušek (Brno) 1.000,-Kĉs; Anna Sniegoňová (Třinec) 100,-Kĉs; Rostislav Podepřel (Vever-

ská Bitýška) 76,- Kĉs.

Estas preparata nova ambaŭ-direkta vortaro (nun okazas la lasta legado kaj korektado de la teksto antaŭ transdono al la eldonejo).

-mm-

ČESKÁ TŘEBOVÁ

E-rondeto AMIKECO en Česká Třebová jam tradicie realigis inter Kristnasko kaj Nova jaro E-silvestron la 29-an de decembro. Kunvenis preskaŭ 70 homoj, kiujn ĝojigis per siaj kantoj operkantisto Miroslav Smyčka el Ústí nad Labem. En konkurso pri Esperantaj vortoj li okupis duan lokon post Květa Hubnová (EK Praha), kiun vi konas kiel venkinton de novembra televida VIDEOSTOP.

Aliaj konkursoj koncernis malnovajn objektojn el muzeo de Česká Třebová kaj elekton de plej interesa E-vesto por vojaĝi eksterlanden: tri vojaĝantoj vestitaj por varmaj landoj en verdaj koloroj (unu kun malseka poŝtuko sur la kapo kontraŭ forta suno), beduino volvita en kovrotuko de piano, japanino kun ĉapelo el lampŝirmilo, vojaĝantino en Ruslandon kun grandega verda stelo kaj esplorantino de norda poluso kun granda ŝovelilo por fari vojjon en neĝo.

Noktomeze la silvestrantoj tostis al Novaj Esperanto-jaro kaj malpakis multajn ricevitajn donacetojn.

Z. Novotná

ÚSTÍ NAD LABEM

Esperanto-klubo en Ústí nad Labem kunvenas kutime la lastan ĵaŭdon en monato en la Domo de Kulturo je la 18-a horo. Al ĝiaj aktivecoj apartenas aŭtuna kultura festivalo omaĝe al T. Pumpr kaj J. Kořínek (en 1992 80 personoj, 17 el Germanio), decembra Zamenhofa kaj antaŭ-kristnaska vespero kun ĉeĥa-

saksa tago (11.-12.12.1992), prelegoj de prof. Novobilský (pri Komenio en la antaŭkongreso kaj en Kronach) kaj kantado de M. Smyčka (Prago, Vieno, Pardubice, Ĉ.Budějovice, Žilina).

La prezidanto ing. Jos. Kříž gastis ĉe la germana E-kongreso en Schwerin. Oktobre 1992 la klubo dediĉis honoran prezidantecon al du germanaj E-pioniroj, nome la 94-jara Arthur Mildner el Pirna kaj al Angela Bode el Schernberg.

- jkms-

SUDA BOHEMIO

Klubo "La ponto" en Písek okazigis la 19-an de decembro 1992 antaŭkristnaskan renkontiĝon de esperantistoj de la suda Bohemio (Tábor, Ĉ.Budějovice, Strakonice, Milevsko) kun kantado, legado el Nova Testamento, rememoro pri L.L.Zamenhof, tombolo kaj aŭkcio de tri donacoj (akiro de financoj por la klubo). La Novjaron ni eniras kun ekzisto-problemoj (klubejoj), sed ni ne perdas nian esperon.

En Arĝenta Mozaiko el Prago oni elsendis en decembro interparolon kun niaj klubaninoj Zdenka Folková kaj Radka Křivánková, ankaŭ pri Esperanto.

-rk-

KUNSIDO DE LA KUNORDIGA KOMITATO

La Kunordiga Komitato de ĈEA kaj SEA kunsidis la 21-an de novembro 1992 en Strážnice (Chrdle, Pluhař, Kočvara - Zvara, Košecký, Göldrich). La prezidanto de ĈEA informis pri la konferenco en Pardubice kaj pri preparo de la ĉeĥa-germana kongreso en Karlovy Vary, la prezidanto de SEA prezentis la aktivadon de SEA kaj kunlaboron kun PEA kaj HEA. ĈEA montris intereson aliĝi al la kunlabo-

ro, kaj ambau asocioj invitis sin reciproke al siaj kongresoj. Ili subtenos siajn aranĝojn publikigante la plej gravajn en siaj gazetoj, specialan subtenon ili dediĉos al komunaj okazaĵoj ĉe la Slovakia-Moravia landlimo (1992 Senica, 1993 Ratiškovice). Fine la Komitato akceptis jenan deklaron:

DEKLARO

Respektante la procedon de memstariĝo de la Ĉeĥa kaj Slovaka Respublikoj la Kunordiga Komitato de ĈEA kaj SEA esprimas sian firman intencon daŭrigi la ĝisnunan kunlaboron kaj reciproke helpon, eĉ daŭre profundigi ĝin. La tradicie bonaj rilatoj inter ambaŭ asocioj estu kontribuo al ilia estonta klopodo pri la fruktodona E-agado.

Strážnice 1992-11-21

Ĉi tiu deklaro estas aprobita de la Konsilio de ĈEA 1992-11-28 kaj de la Asocia Konsilantaro de SEA 1992-12-12.

ESPERANTO MALANTAŬ LA POLUSA CIRKLO

Antaŭ kvin jaroj en februaro 1988 fondis kelkaj oferemuloj en la urbo Murmansk, situanta malantaŭ la Polusa cirklo, E-rondeton, kiu klopodis propagandi la lingvon en tieaj malfacilaj klimataj kondiĉoj. Tamen sukcese, ĉar el la rondeto estas nuntempe E-klubo, kiu organizas kursojn ne nur por plenkreskuloj, sed ankaŭ por gelernantoj de lokaj lernejoj. Kun la klubo kunlaboras ankaŭ kankoro, kies iuj membroj partoprenis eĉ internacian seminario de E-kankoroj en pisanica en Bulgario.

- jp -

diskutoj

Operacio TES - TUTMONDA ESPERANTISTA SOLIDARECO

Por vere viviĝi la esperantan ideon, estas necese gajni al nia afero la popolamasojn, kiuj, bedaŭrinde, atentans tion, kio rekte tuŝas la personojn, havaĵojn kaj komforton.

En ĉiu lando, kie ekzistas E-grupoj, kiuj funkciigas E-kursojn, ni devas starigi ankaŭ kursojn pri la loka nacia lingvo por alilandaj esperantistoj. Tiuj kursoj povos esti zorgataj de la samaj E-grupoj kaj je dispono al ĉiuj fremduloj, kiuj ĉeestas en la loko pro laborado, turismo, studado aŭ aliaj kialoj. Tiamaniere la E-movado fariĝos egalvalora sociala forto, kiu rajte povos postuli la atenton, la respekton kaj dankemon de politikistoj kaj organizoj.

Se mia propono interesas vin, mi ĉiam estas preta por kunlabori al ĝia efektivigo:

**Notario Riccardo dell' Aquila,
Piazza Orsini 1, 82100 Benevento**

PREMGRUPOJ

Ĉefa problemo de la E-movado estas ĝia kronika manko de sufiĉe multnombra bazo kaj nesufiĉa dispono je adekvataj financaj rimedoj. Ni havas bonajn argumentojn por Esperanto, sed ĉar mankas premgrupoj, ni preskaŭ ne povas agi kaj ofte eĉ ne reagi.

La angla lingvo disponas pri ampleksa relative bone funkcianta internacia infrastrukturo. En la kursoj por komencantoj mi ĉiam ree aŭdas partoprenantojn diri, ke la angla estas pli facila ol Esperanto. Kial? Ĉar multaj anglaj vortoj kaj eĉ frazoj jam estas ĝenerale konataj, dum esperantaj nekonataj, do lernendaj. Se per dekretoj de supre Eo iĝus tuteŭrope aŭ

tutmonde devige instruata en ĉiuj lernejoj, estiĝus fortaj protestoj flanke de la industrio kaj de multaj gravaj internaciaj organizaĵoj lige al la demando, kial ŝanĝi funkciantan komunikado-sistemon? Dum per la angla estas preskaŭ ĉio je dispono, per E-o disponeblas preskaŭ nenio.. Kaj se E-o iĝus la dua lingvo por ĉiu, tia situacio certe kondukus al plia kaj plia neglektado de la etnaj kaj naciaj lingvoj. La ebleco, ke ĉiu homo povus senprobleme interkompreniĝi kun ĉiuj aliaj homoj de la mondo, estiĝus multajn interesajn sociojn, kie la naciaj lingvoj perdus signifon. Alia serioza argumento kontraŭ tre facila lingvo estas, ke ĝia instruado ne ligiĝus kun pli alta ĝenerala instruiteco kaj tial ĝi ne estas subteninda.

Kompreneble, ĉion oni povas refuti, sed sole per argumentoj atingebblas nenio. Ni urĝe bezonas fortajn premgrupojn (lobiojn), kiuj povus signife kontribui al ŝanĝo de la ĝenerala sinteno al E-o cele, ke ĝi iĝu grava lingvo. La plej gravaj lingvoj de Eŭropo estas nun la angla, franca kaj germana, do la alilingvaj Eŭropanoj devos regi minimume kvar lingvojn por interkompreniĝi kun siaj samkontinentanoj. Se novaj demokratioj (kaj ne nur ili) komprenus, ke komune oni estas pli forta, ili povus veni al konkordo, ke la neŭtrala lingvo estas ilia komune decidita lingvo por Eŭropo - la tutkontinenta eŭropa domo estas ŝanco, kiu verŝajne tiel baldaŭ ne revenos.

Mi pensas, ke la Esperanta Radikala Asocio kune kun la "La partio nova" en tiu senco movas E-on en la ĝustan direkton.

Adreso: **Franz Knofel, Rotkreuz-Strasse 12, 8068 Pfaffenhofen, Germanio**

RIMARKIGO DE LA REDAKTORO:

Demando estas, ĉu eblas trudi al Eŭropo lingvon, en kiu ekzistas en unuopaj landoj nur poŝvortaroj aŭ mezgrandaj vortaroj kaj kies adeptoj uzas la lingvon nur por ĝia propagando kaj venkigado, iomete ankaŭ por amuza korespondado kaj turismo, sporade por beletro kaj **neniam** por industrio, scienco, tekniko kaj komerco? Ĉu ne estas pli saĝe kaj pli efike, kvankam pli laborpene, dediĉi niajn fortojn por maturigi la lingvon kaj utile ĝin uzi, anstataŭ trudi al la mondo nematuran frukton? Biciklo estas pli facile stirebla ol kamiono, sed ĉu havus ŝancon la ideo anstataŭigi kamionadon per biciklado? La facileco ne estas tiom grava kriterio kiel utileco kaj efikeco.

Miroslav Malovec

ANTVERPENO 93

invitas al la Internacia Kultura semajno (16-23 julio 1993) antaŭ la Universala Kongreso en Valencia. Urbo de Rubens kaj de multaj muzeoj pri pentro-arto, skulptaĵoj, juvelarto kaj diamantoj, proponas ankaŭ ĉevaloperon prezentatan de ciganaj artistoj, koncertojn, orgenmuzikon en katedralo ktp.

Vian restadon prizorgos:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.

INFANKONGRESO 1993

Dum la venonta Universala Kongreso en Valencio okazos en najbara urbeto la 28a Internacia Infana Kongreseto. Ĉar oni ofte supozas, ke tiu aranĝo estas nur por denaskaj esperantistetoj, mi emfazas ĉi tie, ke tiuj, kiuj plej profitas de tiuj renkontiĝoj, estas geknaboj, kiuj eklernis la lingvon

dum la antaŭa jaro.

Se vi mem konas inteligentan, aventureman infanon, kial ne peti de mi informojn pri la venonta IIK? Ĝi promesas esti la ĝis nun plej bona! Kaj eĉ se vi ne konas tian infanon, ĉu vi pretas arigi mondonacojn por subvencii la ĉeeston de iu alia infano el via lando?

Skribu al la adreso de ĉeforganizanto de IIK: **Christopher Fettes, St. Columba's College, Dublin 16, Irlando, tele-fakso 353-1-936655.**

SKRIBU AL RATIŠKOVICE

Tradician printempan turisman aranĝon HLAVÁČEK JARNÍ - PRINTEMPA ADONIDO - 1993 denove organizas Esperanto-klubo Vracov, sabate, la 17.04.1993 en Ratiškovice. Tranoktado eblas.

Same tradician renkontiĝon de ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj je la limregiono moravia-slovakia preparas la Esperanto-klubo Vracov por la tagoj 24.-26.09.1993 en la regiono de folkloro, popolartoj kaj bona vino, en la vilaĝo Ratiškovice, distrikto Hodonín. Tiu ĉi tradicia renkontiĝo okazis jam kelkfoje en diversaj lokoj de tiu ĉi limregiono moravia-slovakia, nome en la urboj Senica 1992, Strážnice 1991, Vracov 1990, Senica 1989 ktp.

Pluajn detalojn, informojn ktp. pri ambaŭ aranĝoj vi ricevos je adreso:
s-ano Jana Melichárková, 696 02 RATIŠKOVICE 938, distr. Hodonín, tel. 0628/967 404.

-vlha-

LA XV-A ĈEBALTA ESPERANTISTA PRINTEMPO

okazos en Mielno, dum la tagoj 6.-12. de junio 1993. Ĝi situas sur la verda terlango de la lago Jamno.

Antaŭtagmeze libera programo, naĝado, post la 17-a horo konversaciaj rondoj, lumbildoj,

konkursoj, naciaj programoj. Du- kaj tripersonaj ĉambroj kun varma akvo, duŝejo suretaĝe, saŭno, satelita televido, kafejo. Prezo: 90 US dolaroj aŭ egalvaloro (ĝis la 30-a de aprilo nur 80 dolaroj). Aliĝo: Pola Esperanto-Asocio, Filio en Koszalin, poŝtkesto 30, 75-016 Koszalin-1, Pollando.

STIPENDIO IVO LAPENNA

Memore al Prof. Ivo Lapenna (1909-1987) kaj liaj elstaraj meritoj por la Internacia Lingvo ĝenerale, kaj ties aplikado en la scienco speciale, **Fondaĵo Ivo Lapenna** starigis **Stipendion Ivo Lapenna**.

La Stipendio konsistas el subvenciado al kiel eble plej multaj **disertacioj je universitata nivelo** (doktoriĝoj, magistriĝoj, licencioj), kiuj temas pri esperantologio aŭ/kaj pri Esperanto en rilato kun interlingvistiko kaj estas ellaboritaj en spirito de L.L.Zamenhof kaj Ivo Lapenna.

La unuan fojon la Stipendio estis aljuĝita en 1992 por jenaj faklaboraĵoj (po 100 svisaj frankoj):

1. "Sprachwandel bei einer Plansprache am Beispiel des Esperanto" (Lingvoŝanĝiĝo ĉe planlingvo je ekzemplo de Esperanto), disertacio akceptita de la Universitato de Konstanz (Germanio); aŭtoro: D-ro Benoit Philippe.

2. "Le lingue della Comunità Europea con particolare riguardo all' inglese" (La lingvoj en la Eŭropa Komunuaĵo, kun aparta atento pri la angla), disertacio akceptita de la Universitato de Torino (Italio); aŭtoro: D-rino Marina Mázzer.

3. "Interlinguistik und Esperanto im Zarenreich und in der Sowjetunion" (Interlingvistiko kaj Esperanto en la cara regno kaj en sovet-Unio); aŭtoro: Andy E. Kunzli.

Stipendio Ivo Lapenna refoje estos aljuĝita en 1993 por **disertacioj oficiale akceptitaj de universitata instanco en la jaro 1992**.

Aŭtoroj dezirantaj kandidatiĝi al la **Stipendio** bv. peti la detalan regularon ĉe la sekretario-kasisto de **Fondaĵo Ivo Lapenna s-ro Torben Svendsen, Vanlose Alle 57, 1.tv., DK-2720. VANLOSE - DANIO**.


NI KOREKTAS PRESERAROJN:

En Starton 6/92 enŝteliĝis kelkaj malicaj preskoldoj.

Sur la paĝo 15 en la artikolo pri Internacia Kultura Festivalo en Ústí nad Labem devas esti kompreneble la nomo **Josef Vích** kaj lia patrina scenejo estas la **operejo de la Nacia Teatro**, ne la **Ŝtata Operejo en Prago**. Kaj ni forgesis menci, ke klarneeton ludis Bohumila Šrutová.

Sur la paĝo 19 en maldekstra kolumno nalsupre devus esti jena frazo: La "S" ne estas komposteraro, sed estas la inicialo de la individua nomo **Sender**, kiu estas la jida ekvalento de **Aleksandro**. Tiuj nomoj estas indiko de la persista influo de la jida lingvo en la parol- kaj penskutimoj de la familio de d-ro Zamenhof.

La redaktoroj de Starto petas pardonon pro la eraroj.



OFERTO DE LA TURISMAJ, KULTURAJ kaj FAKAJ ARANĜOJ
de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio, ties sekcioj kaj kluboj,
kaj de la ĉeĥaj firmaoj uzantaj Esperanton por la jaro 1993

Enhavo de la sciigoj:

NOMO DE LA ARANĜO

Dato kaj loko de la aranĝo

KA = kontaktadreso

Partoprenkotizoj/prezoj (se jam estis difinitaj)

Eventualaj rabatoj

- (01) JIZERSKO-KRKONOŠSKÝ LEDŇÁČEK (= Alcedo de Jizery kaj Karkonoŝo)
1993-02-18/21
Turisma renkontiĝo de juna kaj mezaĝa generacioj
Prezo: ekde jaŭdo 135,- Kčs (infanoj ĝis 14jaraj 105,- Kčs),
ekde vendredo 90,- Kčs (infanoj ĝis 14jaraj 70,- Kčs).
Etaj infanoj, kiuj ne bezonas propran liton, senpage.
Plenaĝaj nemembroj de ĈEJ pagos plie 10,- Kčs por tago
KA: Jan Navrátil, Masarykova 1596, 415 02 Teplice
- (02) TRADICIA ESPERANTO-BALO DE NEFUMANTOJ EN ĈESKÁ TŘEBOVÁ
KA: Zdeňka Novotná, Matyášova 399, 560 02 Česká Třebová
- (03) DRUHÉ ŤUKÁNÍ (Dua Perkutado)
seznamovací akce mládeže pro nováčky - interkona aranĝo por komencantoj
1993-02-26/28
KA: Jana Charuzová, Dukelská 2, 795 01 Rýmařov
- (04) FAKAJ APLIKOJ DE ESPERANTO EN (sed ne nur) FREVOJO
(Seminario sub aŭspicioj de la Terminara kaj Faka Aplika Komisionoj de IFEF)
1993-03-12/15, Praha
KA: KAVA-PECH, Anglická 878, CS 252 29 Dobřichovice;
tel./fakso: 2.201 641.
Rabato 7% por la membroj de ĈEA kaj SEA
- (05) HOBBY SETKÁNÍ (= Hobio-renkontiĝo)
1993-03-21, Strážnice
KA: Esperanto, p.s. 34, CS 696 62 Strážnice
- (06) JAZYKOVÝ SEMINÁŘ (= Lingva Seminario)
(Preparo por la asociaj lingvaj ekzamenoj)
Marto/aprilo (la dato ankoraŭ precize ne anoncita)
KA: f-ino Vlastka Chvátalová, ĈEJ, Jilská 10, 110 00 Praha 1
- (07) PRINTEMPA RENKONTIĜO (= Jarní setkání)
1993-04-02/04, Železná Ruda (Ostrý)
KA: f-ino Jitka Skalická, Koněvova 227, CS 130 00 Praha 3
Prezoj proksim.: enlandanoj: 300,- Kčs, eksterlandanoj: 600,- Kčs
- (08) VELIKONOCE (PASKO)
1993-04-09/12, ie en Moravio aŭ orienta Bohemio
KA: f-ino Blanka Gruntová, Vítězná 95, CS 784 01 Červenka
- (09) HLAVÁČEK JARNÍ (= Printempa Adonido)
(Ekskurso en la naturon kaj vinkelon)
1993-04-17, Ratiškovice
KA: s-ino Jana Melichárková, CS 696 02 Ratiškovice 938
- (10) ASOCIAJ EKZAMENOJ (Svazové zkoušky)
1993-04-24, loko estos precizigita
KA: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno

- (11) JUSETUR
1993-05-20/23, Praha
KA: f-ino Lucie Karešová, ČEJ, Jilská 10, CS 110 00 Praha 1
- (12) UNUA KOMUNA KONGRESO DE GEA KAJ ĈEA
1993-05-28/31, Karlovy Vary
KA: Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno
- (13) III. ročník výslapu esperantistů na Praděd, nejvyšší vrchol Moravy (III-a suprenmarŝo al la monto Praděd)
1993-06-19, 9.30 horo, Karlova Studánka
KA: Štefan Takáč, Hrdinů 1158, 783 91 Uničov
- (14) 45-a KONGRESO DE IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio)
1993-06-03/15, Cervia (Italujo)
a/ Aŭtobusa karavano al la kongreso, eblas du alternativoj:
1-a luksa aŭtobuso kaj loĝado en dultitaj bone ekipitaj hotelĉambroj; 2-a modesta neklimat. aŭtobuso, loĝado en plurlitaj ĉambroj kaj memstara manĝoprizorgado
KA: KAVA-PECH, Anglická 878, CS 252 29 Dobřichovice;
tel./fakso: 2.201 641.
Rabato 7% por la membroj de ĈEA kaj SEA
b/ Komuna karavano de la Fervojista Sekcio de ĈEA
KA: f-ino Jitka Skalická, Koněvova 227, 130 00 Praha 3
- (15) INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO 93
1993-07-10/17, Františkovy Lázně
KA: s-ro Josef Vaněček, Soukenická 58, CS 274 01 Slaný
Prezroj por enlandanoj: 550,-- Kčs (loĝado + matenmanĝo), 730,- Kčs (loĝado, matenmanĝo kaj tagmanĝo aŭ vespermanĝo), 910,- Kčs (loĝado + tuttaga manĝo); por eksterlandanoj de 1600,- Kčs ĝis 2000,- Kčs.
- (16) HOBBY SETKÁNÍ (= Hobio-renkontiĝo)
1993-07-11, Strážnice
KA: Esperanto, Vladislav Hasala, p.s. 34, 696 62 Strážnice
tel.: 0631/942507 kun registrilo
- (17) RENKONTO ICEM 1993
1993-07-14/23, Rybitví ĉe Pardubice
KA: (por Ĉeĥio kaj Slovakio) s-ino Jarmila Rýznarová, Na Okrouhlíku 953/21, 530 03 Pardubice
Prezo por t.n. "eksocialismaj" landoj = 3920,- Kčs
Rabato 25% por la membroj de ĈEA kaj SEA
- (18) 78-a UNIVERSALA KONGRESO
1993-07-23/08-02, Valencia (Hispanujo)
(Flugkaravano al UK kun vizitoj de Madrid kaj Barcelona)
KA: KAVA-PECH, Anglická 878, CS 252 29 Dobřichovice;
tel./fakso: 2.201 641.
Rabato 7% por la membroj de ĈEA kaj SEA
- (19) SOMERA ESPERANTISTA TENDARO (SET)
3 dusemajnaj etapoj: 07-4/17; 07-18/31; 08-1/14; Lančov
KA: Esperanto, 674 01 Třebíč
- (20) SOMERAJ ESPERANTO-KURSOJ
julio/aŭgusto, 1993, Praha (ev. Olomouc)
KA: P.+V.Dvořákovi, Ostravská 637, 199 00 Praha-Letňany
tel/fax: 02-899 602
- (21) 66-a KONGRESO DE SAT
1993-08-10/24, Kazanlak (Bulgarujo)
(Aŭtobusa karavano al la kongreso kun la antaŭa vizito de Grekujo kaj mallonga vizito en Istambulo, Turkujo)
KA: KAVA-PECH, Anglická 878, CS 252 29 Dobřichovice;

tel./fakso: 2.201 641.

- (22) Rabato 7% por la membroj de ĈEA kaj SEA
12-a SANMARINA UNIVERSITATA SESIO de AIS
1993-08-25/09-06, San Marino
(Aŭtobusa karavano kun turisma programo en okcidenta kaj suda Aŭstrio kaj norda Italujo survoje)
KA: KAVA-PECH, Anglická 878, CS 252 29 Dobřichovice;
tel./fakso: 2.201 641.
- (23) Rabato 7% por la membroj de ĈEA kaj SEA
LABORBRIGADO - VERDA HELPO
Laborbrigado organizata de la sekcio de naturamikoj ĈEA en Sobotín, distr. Šumperk, 1993-08-14/28
KA: Stanislav Droppa, Sídliště 546/B, 788 14 Rapotín
- (24) VÝROČNÍ KONFERENCE SŽ ČES (= Jar-konferenco de Fervoj.Sekcio)
1993-09-17/19, Mariánské Lázně
KA: f-ino Jitka Skalická, Koněvova 227, CS 130 00 Praha 3
- (25) RENKONTIĜO ĈE LA MORAVIA-SLOVAKIA LANDLIMO (= Setkání na moravsko-slovenském pomezí)
1993-09-25/26, Ratiškovice
KA: s-ino Jana Melichárková, CS 696 02 Ratiškovice 938
- (26) VINA SEMINARIO (Vinařský seminář) 1993, Bzenec
KA: f-ino Jana Burianová, Renneská 35, CS 639 00 Brno
- (27) SETKÁNÍ SBĚRATELŮ ESPERANTSKÝCH MATERIÁLŮ
(= Renkontiĝo de la Kolektantoj de Esperantaĵoj)
1993-11-05/07, Strážnice
KA: Esperanto, p.s. 34, CS 696 62 Strážnice
- (28) KONFERENCO DE ĈEJ (= KONFERENCE SEKCE MLÁDEŽE ČES)
novembro/decembro 1993, la regiono Posázaví
KA: f-ino Vladka Chvátalová, ČEJ, Jilská 10, 110 00 Praha 1
- (29) EKSKURSOJN
al Bulgarujo, Litovujo kaj Tunizio organizas vojaĝagentejo de la kooperativo INTERHELPO
KA: Interhelpo, p. tř. 44, CS 150 00 Praha 5
Esperantan medion oni ne povas garantii se ne aliĝos sufiĉa nombro da esperantistoj!
- (30) TŘETÍ TUKÁNÍ (Tria Perkutado)
seznamovací akce pro nováčky - interkona aranĝo por novuloj
1993-oktobro/novembro
KA: Jana Charuzová, Dukelská 2, 795 01 Rýmařov
- (31) KONFERENCE SEKCE MLÁDEŽE ČES (Konferenco de ĈEJ)
1993-novembro/decembro
KA: Vladka Chvátalová, ČES, Jilská 10, 110 00 Praha 1

OFERTO DE LA TURISMAJ, KULTURAJ kaj FAKAJ ARANĜOJ

de la Slovaka Esperanto-Asocio kaj de ESPERANTO-CENTRO,
Sobotské náměstie 6, 058 01 Poprad, Slovenko, tel. 092-32419

- (01) Skisemajno (ebleco skii en Altaj Tatroj)
1993-02-12/19, Poprad, 7 tagoj
Prezo: 70 USD - 105 DEM
Rabato 30%
- (02) Vintra Esperanto-Lernejo
1993-02-13/26, Poprad, 13 tagoj
Prezo: 130 USD - 195 DEM
Partoprenkotizo: 15 USD - 23 DEM
Rabato: 40%



- (03) Vintra Turisma Semajno
1993-03-5/11, Poprad, 6 tagoj
Prezo: 60 USD - 90 DEM
Rabato 30%
- (04) Vintra Esperantista Renkontiĝo en Altaj Tatroj - VERAT-93
1993-03-19/21, Poprad, 2 tagoj (ekologio, naturprotektado)
Prezo: 20 USD - 30 DEM
Partoprenkotizo: 4 USD - 6 DEM
Rabato 30%
- (05) Internacia Renkontiĝo de korespondkursanoj
1993-05-7/9, Poprad, 2 tagoj (instruistoj kaj lernantoj)
Prezo: 20 USD - 30 DEM
Partoprenkotizo: 4 USD - 6 DEM
Rabato 30%
- (06) Printempa Renkontiĝo en Altaj Tatroj - PERAT-93
1993-05-7/9, Poprad, 2 tagoj (naturprotektado, flaŭro)
Prezo: 20 USD - 30 DEM
Partoprenkotizo: 4 USD - 6 DEM
Rabato 30%
- (07) Somera Esperanto-Lernejo - SEL-93
1993-07-3/16 kaj 1993-08-7/20, Poprad, 13 tagoj, 1 etapo
Prezo: 130 USD - 195 DEM
Partoprenkotizo: 15 USD - 23 DEM
Rabato 40%
- (08) Internacia Lernejo por Funkciuloj de Esperanto-Organizaĵoj
1993-08-7/20, Poprad, 13 tagoj
Prezo: 130 USD - 195 DEM
Partoprenkotizo: 15 USD - 23 DEM
Rabato 40%
- (09) Turisma Semajno en Slovakia Paradizo - TUSE-93
1993-07-31/1993-08-6, Slovakia Paradizo, Sp. Nova Ves, 6 tagoj
Prezo: 90-110 USD, 140-180 DEM
Partoprenkotizo: 9 USD - 14 DEM
Rabato 40%
- (10) Mikologia Seminario (Terminologia agado, praktika fungo-
kolektado)
1993-09-10/14, Poprad, 4 tagoj
Prezo: 40 USD - 60 DEM
Partoprenkotizo: 6 USD - 9 DEM
Rabato 30%
- (11) Aŭtuna Subatra Semajno - Altmontara Turismo
1993-09-14/20, Poprad, 6 tagoj
Prezo: 60 USD - 90 DEM
Partoprenkotizo: 8 USD - 12 DEM
Rabato 30%
- (12) Aŭtuna Esperanto-Lernejo - AEL-93
1993-10-9/22, Poprad, 13 tagoj
Prezo: 130 USD - 195 DEM
Partoprenkotizo: 15 USD - 23 DEM
Rabato 40%
- (13) Kulturaj Esperanto-Tagoj
1993-11-19/21, Poprad, 2 tagoj
Prezo: 20 USD - 30 DEM
Partoprenkotizo: 4 USD - 6 DEM
Rabato 30%

Esperanto

- (14) Sankt-Nikola Festo-Renkontiĝo
1993-12-4/6, Zakopane, Pollando (el Poprad forveturo per aŭtobuso), 2 tagoj
Prezo: 35 USD - 53 DEM
Partoprenkotizo: 4 USD - 6 DEM
Rabato 20%
- (15) Silvestra Balo - Vintraĵ Ekskursoj
1993-12-30/1994-01-2, Poprad, 3 tagoj
Prezo: 40 USD - 60 DEM
Partoprenkotizo: 5 USD - 8 DEM
Rabato 20%
- (16) Diversaj turismaj, kulturaj kaj fakaj aranĝoj laŭ mendo de enlandaj kaj eksterlandaj Esperanto-Organizaĵoj. La restadon estas eble mendi ankaŭ individue.
Dato: kiam ajn, Poprad aŭ alia
Prezo: 1 tago kostas 10 USD aŭ 15 DEM (manĝaĵo 3-foje tage, turisma loĝejo en plurlitaj ĉambroj)
Partoprenkotizo: laŭ interkonsento
- Unuopaj servoj kostas: tranokto (lito-nokto) 3 USD, matenmanĝo 1,5 USD, tagmanĝo 3 USD, vespermanĝo 2,5 USD. Eblas mendi servojn en hotelo laŭ aktualaj prezoj.

Esperanto-Centro

RUDOLF TĚSNOHLÍDEK (1882-1928)

Antaŭ 65 jaroj pafmortigis sin ĉeĥa verkisto, kies bonhumoran libron pri ruza vulpino famigis en la mondo la komponisto Leo Janáček per opero Aventuroj de vulpino Ruzulino. La rakonton verkis Těsnohlídek laŭ desegnoj de Stanislav Lolek, do temas pri kolektiva verko. Těsnohlídek verkis plurajn infanlibrojn, poemojn, eminentajn felietonojn de antaŭ tribunaloj kaj li kiel unua prilaboris la rakontadon de Eskimo Welzl, kies alia libro "Tridek jaroj en la ora nordo" (prilaborita de la verkistoj Valenta kaj Golombek) fariĝis klasikaĵo ankaŭ de Esperanta literaturo. Li estis la unua, kiu venis kun ideo starigi sur la ĉeĥa placo de Brno grandan lumigitan Kristarbo por malriĉaj kaj orfaj infanoj.

Li naskiĝis en Čáslav 7.6.1882 kiel filo de malestimata likvidisto de bestkadavroj, kio dumvive preme melankoliigis lian psikon, same kiel nekuracebla okuldefekto. En gimnazio en Hradec Králové kiel lia kunlernanto studis ankaŭ Antonio Vančura, verkanta kaj fama sub pseŭdonomo Jiří Mahen, kune ili studis filozofion ankaŭ ĉe la universitato en Praha. Těsnohlídek ne finis la studadon kaj fariĝis ĵurnalisto en Brno, verkisto kaj tradukisto el skandinaviaj lingvoj. Pafis fermis lian vivon 12.1.1928.

František Kožík: Mi similas al Kristarbo
(romano pri Rudolf Těsnohlídek, Praha 1993)

En la memorinda jaro 1924 travivis Rudolfo ankoraŭ unu grandan satisfakcion: li sukcesis venkigi ideon, ke sur la placo de Brno estu levita Kristarbo de la respubliko.

Ekde la trovo de la formetita novnaskito en 1919 li ne ĉesis aserti, ke la mizeron de forlasitaj, orfiĝintaj infanoj necesas iamaniere solvi. En Brno jam delonge ekzistis ja Bonfara Komitato, kiu prizorgis vestadon kaj feriadon de ĉeĥaj orfoj, eldonataj

estis ankaŭ almankoj nomataj Por malriĉaj infanoj, kies profito estis dediĉita por bonfaraj celoj, sed ĉio ĉi ne sufiĉis.

Li ĉeestis, kiam la 6-an de decembro la arbhakistoj faligis elektitan abion proksime de la loko, kie antaŭ kvin jaroj estis trovita la bebo. Li vidis, ke la arbaristoj kaj arbhakistoj traktis la arbon kvazaŭ filinon, kiam ili devis doni la unuan hakilbaton. Kvankam li sciis, ke la misio de la arbo estas alporti bonon al bezonantoj, emociis lin kompato, kiam la bela abio falis en muskon. Per varmaj vortoj li adiaŭis la arbon en la vilaĝa placo de Bílovice. La muziko ludis ambaŭ himnojn.

La 15-an de decembro ekstaris la unua Kristarbo de la respubliko sur la placo - sur la loko, kiun destinis por ĝi Těsnohlídek: tie, kie dum la aŭstra regado staris ligna Wehrmann, simbolo de la milita malamo, en kiun oni enbatis najlojn aĉetitajn je mono kiu subtenis la regnon. Těsnohlídek anstataŭigis ĝin per simbolo de oferema amo. Kaj li jam ankaŭ sciis, kian nomon portos la hejmo, kiun li konstruigos per la mono, kiun akiros la kolektantoj: laŭ la filino de Přemysl Otakar la II-a, bonkora reĝino Dagmar, adorata en Danlando. "Estus pli bone," li skribis klarvide, "se la arbo starus sur la placo sole por ornami, se ne estus necese pendigi sur ĝin petojn." Sed la homa kompatemo ankoraŭ estis bezonata.

Ekde la unua tago la arbo iĝis interes-centro de la loĝantaro. La simbola "termometro de la amo" ĉiuvespere montris, kian altecon atingis la kolektado. Brno fieris pri la arbo kaj la hidrarga kolumno ambiciigis ĉiujn, kaj studentojn, kaj infanojn.

Vendrede la 12-an de januaro 1928 venis Těsnohlídek en la redaktejon nur tagmeze. La kancelarioj jam estis senhomaj. Nur ĉe la telefono sidis sinjorino Novotná kaj de malantaŭe sonis tajpilo de la tajpisto Kuběna. Post la dekdua preteriris Golombek kun Valenta.

Rudolfo ordigis la objektojn sur la tablo. Rapide li ankoraŭ skribis papereton kun konciza mesaĝo kaj almetis poemon, per kiu li okupiĝis dum pluraj januaraj tagoj. Apude kuŝis lasta numero de la norvega Aftenpost.

Kaj poste li elprenis el tirkesto revolveron, celis al la koro kiel iam Kaja, lastfoje li imagis ŝian tompoŝtonon - kaj premis la ellasilon.

Li eksentis tranĉan doloron en la brusto. Li supozis, ke tuj venos mallumo kaj nenieco. Sed li ne sinkis al la tero: li vidis plu sian kancelarion kaj sian tablon. La pistolo elfalis el lia mano. Instinkte li ekmovis sin al la direkto, kie li antaŭe aŭdis tajpilon. Li premis la klinkon. La oficisto Kuběna aŭdis pafon kaj elkuris en la koridoron. Li ekvidis antaŭ si mortpalan Těsnohlídek, kiu ŝanceliĝis kaj premis la manplaton sur la koron.

"Ĉu vi deziras ion, sinjoro redaktoro?" li demandis terurite. Těsnohlídek montris al la pistolo sur la tablo. "Mi malbone celis..." Inter la fingroj fluis sango.

Kuběna helpis lin ekuŝi sur divanon kaj telefonis por ambulanco. Post momento ekgrincis malsupre ĝia motoro.

Kiam la redaktistoj revenis, la redakciaj ĉambroj estis plennigitaj per teruro. Oni parolis nur pri Těsnohlídek, rememoris liajn vortojn, kiuj antaŭis la agon. Poste ili telefonis al la hospitalo kaj aŭdis la fatalan vorton: Fino.

Li havis kvardek ses jarojn.

(trad. M. Malovec)

STARTO RECENZAS

FERVOJFAKAJ KAJEROJ

Neregula informilo pri fakaj fervojaj aferoj. Redaktas Ladislav Kovář, Grégrova 44, 560 03 Česká Třebová, eldonis Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, kajero n-ro 1, aprilo 1992, eldonkvanto 200 ekzempleroj.

La unua kajero de nova faka periodaĵo prezentas al ni post antaŭvortoj de P. Engen rekomendojn por verkado de fakaj artikoloj pri fervojo (P. Chrdle), pledon por seneraraj fervojfakaj tekstoj (L. Sekereš) kaj por distingado de kvalitoj en rilato de nocio kaj nomo (J. Werner), difinon de la fervojo (H. Hoffmann), konatiĝon kun pola elektro-mova lokomotivo EM-10 (J. Fortunski) kaj kun funkcioj kaj servoj de okcidentaj fervojoj (J. Giessner), ne mankas ankaŭ konkludo de la redaktoro (L. Kovář). Salutinda eldono de nia plej aktiva sekcio!

MANUSKRIPTOJ POR BRULIGO

estas titolo de modesta 32-paĝa kajereto (formato A6), en kiu bulgara pupteatristo Ljubomir Trifončovski elŝovas antaŭ la kurtenon siajn ludige ludemajn tekstojn por dumvivaj infanoj, kiel trafe mencias la prefacinto Georgio Silfer. Interparolo de Luno kun cervo fuĝanta antaŭ proksimiĝantaj ĉasistoj, kvereloj de obstinaj kokidoj, kaj kurtaj poemecaj prozajetoj karesos la leganton mallonge, sed milde. Ilustris Arnau Totras, eldonis Pres-Esperanto, Sofio 1992.

LA TROJA MILITO NE OKAZOS

Sprita teatraĵo de Jean Giraudoux (1882-1944), moderna klasikulo de la franca literaturo, ne nur plantos nin rekte inter la glorajn rolulojn de la fama skandala kazo "Troja milito", sed samtempe daŭrigas la vicon "Antologieto de la franca literaturo", per kiu la revuo Franca Esperantisto frandigas al la esperantistaro klasikaĵojn de sia lando. En la sama serio kaj vesto jam defilis Beaumarchais, Racine, Flaubert, Molière, Montesquieu, Merimee, Daudet, Hugo, Maurois, Cocteau, Courteline, Supervieille kaj aliaj steloj sur la franca ĉielo. En UK Vieno oni povis vidi jam plurajn kajerojn kunbinditaj en du dikajn librojn de la Franca Antologio. La tria volumo jam koviĝas.

49-A JUNULARA KONGRESO 1993

en la bulgara urbo Vraca (7-14 aŭgusto) havos kongresan temon "Ekonomio kaj socio en ŝanĝoj". Oni antaŭvidas abundan kulturan, distran, sportan kaj ekskursan programon, interalie ortodoksajn kantojn en la kaverna Ledenika. LKK organizos karavanon el UK en Valencio al Vraca tra Timisoara en Rumanio. Oficiala antaŭkongreso estos Internacia Junulara Semajno en Hungario. La unuaj kvin aliĝintoj al ambaŭ aranĝoj ricevos abonon al Eventoj por 1993.

La aliĝilon publikigos **TEJO Tutmonde, Eventoj, Bulgara Esperantisto**.

Adreso de LKK:
Esperanto, p. k. 26, BG-3000
Vraca, Bulgario.

EL LA VIVO DE NIAJ SPONGOJ

RNDr. E. Wohlgemuth, CSc

Spongoj estas akvaj animaloj, kiuj formas en la animala sistemo memstaran izolatan grupon. Ili estas konataj kiel "maraj spongoj", kolektataj kaj post sekigado uzataj por lavado. Niaj "spongoj" el molitana kaj gumo estas artefaritaj anstataŭaĵoj, al kiuj restis nur la nomo. La spongoj estas animaloj netipaj, tute senmovaj, opiniataj ofte plantoj - de tiu eraro originas nia ĉeĥa nomo "houby" (= spongoj, fungoj), kvankam kun la arbaraj fungoj ili havas nenion komunan.

La spongoj vivas kutime en la maro, sed unu familio troveblas ankaŭ en freŝaj akvoj. Ĉe ni vivas ses specioj, la plej abundaj estas fiŝlaga spongo kaj rivera spongo. Niaj spongoj formas tufojn kaj tegojn de diversaj formoj sur la fundo kaj sur diversaj objektoj en la akvo. Ili estas blankecaj, iam verdetaĵoj de algoj kreskantaj sur ilia surfaco. Ili vivas en stagnantaj kaj ankaŭ en fluantaj akvoj. Sur la sponga surfaco videblas aperturoj. Tra la malgrandaj la akvo eniras, tra la grandaj eliras. Interne en malgrandaj kavetoj specialaj ĉeloj per flageloj elkaptas el la akvo ĉion digesteblan. La spongo tiel funkcias kiel viva filtrilo.

Tufoj kaj tegoj de la spongoj kreskas dum la tuta jaro kaj en aŭtuno kutime pereas. En malfrua somero kaj en aŭtuno

Vortarato:

tufo - chomáč
tego - potah
flagelo - bičičik
aperturo - otvor

ĉelo - buňka
burĝono - poupě
spongo - houba (živočich)
fungo - houba (rostlina)



eblas vidi en spongoj etajn globetojn en grandeco de pinglaj kapoj. Tio estas vintraj burĝonoj. Ili povas sekiĝi kaj frostiĝi, kaj printempe kreskas el ili novaj spongoj. Ventoj kaj akvaj birdoj kapablas transluki la burĝonojn en aliajn akvojn, tial oni trovas la freŝakvajn spongojn en ĉiuj kontinentoj.

Niajn spongojn ni povas vidi plej ofte surfunde de senakvigataj fiŝlagoj.



KURACAJ PLANTOJ EN LA HISTORIO KAJ NUNTEMPE

RNDr J. Šikula, CSC

Uzado de la kuracaj plantoj estas malnova kiel la kulturo mem de la homaro. En ĉiuj landoj de la mondo primitivaj homoj uzadis plantojn ne nur kiel manĝaĵojn, sed ankaŭ por sia sano. Ankaŭ bestoj akceptas diversajn plantojn ne sole kiel nutraĵojn, sed ankaŭ kiel sanigilon. Ekzemple multe da animaloj bone konas sekajn foliojn de kverko kiel medikamenton kontraŭ malsanoj de la digestaj organoj, aŭ foliojn de saliko kontraŭ doloro.

En la homa medicino estas jam tradicie utiligataj medikamentoj preparitaj el folioj, floroj, fruktoj aŭ radikoj de diversaj plantoj. Pro veneneco de multaj kreskaĵoj estis kaj estas preparado kaj uzado de medikamentoj el kuracaj plantoj tre danĝera afero, fidinda nur ĉe specialistoj kiel farmaciistoj kaj doktoroj de medicino. En la nuntempo sole ili rajtas prepari kuracilojn.

La historio konas kuracajn plantojn ne nur ĉe eŭropaj nacioj, sed ankaŭ ĉe la afrikaj kaj aziaj (precipe en Hindujo, Ĉinujo, Japanujo) kaj en Ameriko havis bonegajn kuracistojn Majaoj kaj Aztekoj.

Theophrastus (373-288 a.K.) en la antikva Greklando konis grandan kvanton de plantoj kaj priskribis ilin en siaj libroj (Historia naturalis, Historia plantarum, De causis plantarum), pro kio li estas nomata "patro de la botanikistoj". Ankaŭ Plinius (23-79 p.K.) eminentiĝis kiel botanikisto kaj specialisto pri venenaj kaj kuracaj plantoj. Librojn pri metodo kiel uzi plantojn kontraŭ malsanoj ĉe homoj kaj bestoj verkis granda kuracisto Dioskoridos en la jaro 77. La mezepoko aplikis papaveron kiel

medikamenton kontraŭ doloro, nun ĝi servas kiel drogo.

La novtempa farmacio estas specialigita scienco, prilaboranta ne nur plantojn, sed per kemiaj kaj fizikaj metodoj preparanta ankaŭ specialajn ekstraktojn. Sciencaj metodoj nun okupas la unuan lokon de graveco. Nun kreskas la intereso pri uzado de la kuracaj plantoj ne nur ĉe specialistoj, doktoroj de medicino kaj farmaciistoj, sed ankaŭ ĉe laikoj.

Ĉu eblas kuraci sen studado de la medicino, farmacio, biokemio ktp.? Ni ne rajtas aserti, ke tio ne estas ebla, ĉar multaj homoj posedas apartan talenton kaj internajn fortojn, kiujn la nuntempa scienco ne bone konas. Sed kiel distingi seriozan laikan kuraciston disde ĉarlatano?

En la bonhumora gazeto Dikobraz (Histriko) aperis foje desegno de nia fama karikaturo Nprakta kun jena enhavo: ĉeĥa kuracisto post pluraj jaroj travivitaj en la centra Afriko revenis en nian respublikon kaj kuracis en hospitalo per metodoj de afrikaj ŝamanoj. Du aliaj doktoroj observas tra duonfermita pordo liajn ŝamanajn dancojn kaj unu el ili rimarkigas: "Tio estas terura!" La alia replikas: "Terure estas, ke la metodo helpas!"

La aplikado de kemio en la medicino ĉesis esti idealo, kaj la hospitaloj kun poliklinikoj revenas al resanigaj plantoj, teoj, unĝventoj ktp. Ĉu tio estas reveno al la mezepoko? Certe ne, ni nur serĉas novajn vojojn, ĉar la scienco ekkonis kemion, fiziologion, fizikon, biokemion, biologion kaj aplikis fortajn kemiaĵojn, kiuj resanigadis tre rapide, sed pro forta rapida efiko estis vene-

naj por la organismo. Kuraciloj el plantoj helpas malrapide, per malgranda koncentriĝo. Ni ĉiuj bone konas antibiotikojn. Ili estas medikamento mirakla kontraŭ bakterioj, sed samtempe danĝera. Se ni malĝuste aplikas la antibiotikon, la bakterioj kutimiĝas al ĝi, la antibiotiko poste estas malforta kaj ne povas nin kuraci.

Uzante kuracajn plantojn kaj teojn laŭ malnovaj metodoj ni resaniĝas ne post tri tagoj, sed nur post unu semajno, tamen la malsano ne revenas kaj ne produktiĝas bakterioj rezistaj kontraŭ antibiotikoj. Kuracaj plantoj estas vojo, kiun al ni montras la neoficiala medicino nomata alternativa.

Tamen necesas memori, ke inter tiuj ĉi popularaj medicinistoj troviĝas ne nur bonaj specialistoj, sed ankaŭ trompaj ĉarlatanoj.

La scienca medicino kun kaj sen la kuracaj plantoj ĉiam evoluas, kio estas tre bone, ĉar la personoj dotitaj per speciala talento ne povas resanigi grandajn nombrojn da homoj.

Do, karaj samideanoj, ĉu vi jam scias, kia estas diferenco inter la oficiala kaj alternativa medicinoj? La respondo ne estas facila. Ni ĉiuj konas tre multe, sed la tuta homaro ne konas ĉion.

BROŝURETOJ PRI TRENTO

La Agentejo de Turisma Promocio de la Trenta Regiono en Italio eldonis en Esperanto du belajn broŝuretojn pri vintra kaj somera sezonoj, kiujn vi povas ricevi **senpage** je adreso: APT - AZIENDA DI PROMOZIONE TURISTICA DEL TREN-TINO, I-38100 TRENTO - Via Sighele 3, Italio.

La ortografie konfuza vorto "apartemento"

Bernard Golden

Legu la sekvajn kvin citaĵojn kaj serĉu la eraran vortformon.

1. "nun laboristoj, almenaŭ en Okcidento havas aŭton, havas domon aŭ apartementon, almenaŭ la plej multaj ..."

(The Worker Esperantist)

2. "En Castelldefels oni oferis, kontraŭ antaŭpago por kompleta apartemento, tiun ejon sen eblo kuiri, pro manko de manĝilaro."

(Fenomeno)

3. "Napoleono eĉ loĝas en apartementoj apartigitaj de tiuj de la aliaj."

(Besto Farmo)

4. "S-ro Fajzsi uzis sian propran vastan apartementon .."

(Nov-Zelanda Esperantisto)

5. "Poste li veturigis min al sia loĝejo en la plej alta etaĝo de apartementa domo ..."

(Vojaĝ-raporto 1988 - de Rudi-ger Eichholz)

En ĉiu frazo troviĝas la vortformo "apartemento", kies tria vokalo estas "e". Kial? Oni apenaŭ povas uzi la pretekston, ke temas pri kompostero, ĉar la preseja koboldo ne kapablas tiel malice agi en kvin diversaj publikigaĵoj.

La kaŭzo de la eraro estas la simpla fakto, ke la verkintoj de la kvin frazoj ne scias, ke la ĝusta vorto en Esperanto estas "apartamento", en kiu la tria vokalo estas "a". La misa formo konfuzis ilin, ĉar ili sendube pensis pri la vorto "departemento", kiu havas la vokalon "e"!

Tiuspeca malsimetrio ne estas tolerenda en planlingvo. Kiel, do, povis okazi, ke ĝi enestas en Esperanto? La plej simpla klarigo estas, ke la du vortoj estis enkondukitaj en la leksikon de la lingvo, ne sam-

tempe sed en du malsamaj periodoj. "Departemento" apartenas al la dua Oficiala Aldono al la Fundamenta **Universala Vortaro**, dum "apartamento" estis oficialigita en la tria Aldono. Plej probable pro tio la erudiciuloj de la Akademio de Esperanto preteratentis tiun anomalion. Ĉu nun estas tro malfrue ĝustigi la mankon de analogio en la du vortoj?

Tiu ĉi artikolo pritraktas nur duonon de la problemo. Estas eble citi frazojn similajn al la ĉi-supraj, en kiuj aperas la erara vortformo "departemento". Estas emfazende, ke tiuj esperantistoj, kiuj faras erarojn pri la ĝusta ortografio de "apartamento kaj "departemento" **ne estas komencantoj**; ili estas lingvouzantoj kun plurjara sperto, sed malgraŭ tio, ili stumblis!

INTERNACIA PACA FORSTO

Per la sorbado de CO₂ kaj la konservado de multe da karbono en sia ligno, arboj renovigas nian plej fundamentan provizon per la disdono de oksigeno, kiu taŭgigas la aeron, ĝis ĝi estas enspirinda, kaj samtempe helpas mildigi la globvarmiĝadon. La arbo ne kapablas perforti kaj nur per sia "esteco" povas solvi multajn el la problemoj, kiuj alfrontas aliajn vivaĵojn. En sia karaktero la arbo estas forta, benigna kaj belega.

La Superviveco dependas de la arbarega renovigo. Plantu Arbon por Paco.

La partoprenado estas nur planto de unu aŭ pli da arboj laŭ via elekto en iun ajn lokon, kie vi havas enirrajton. Ĉiu arbo aŭ grupo da arboj indikita per la sekva ŝildo:

"Plantita kiel parto de la Internacia Paca forsto je (dato) kaj decidita al la ne-

perforta solvo de internacia konflikto."

Oni tiam sendas la detalojn pri la plantado por meti sur la mondmapon.

Pluaj detaloj pri la **Internacia Paca Forsto** estas havigeblaj per la sendo de I.R.K. kaj memadresita koverto al: **P.O. Box 7, Stroud, Gloucestershire, GL5 1JQ, Britio.**

KABLAJ PENDVOJOJ TRANSPORTAS DANGERULOJN

En la plej alta montaro de la ĉeĥaj landoj (la plej alta monto sur la limo kun Polio atingas pli ol 1600 m) estas pluraj kablaĵ pendvojoj por "komforto de montaraj turistoj kaj skiistoj". Ekologie ja ili tiom ne difektas la montaran sferon, ĉar ilin funkciigas la elektro, sed ili ebligas aliron al tiuj "komfortemaj turistoj", kiuj poste jam pro sia ĉeesto difektas la montaran faŭnon kaj precipice la montaran flaŭron. Ili ne atentigas ties protekton, kiel faras veraj piedaj turistoj interesiĝantaj aŭ pri flaŭro aŭ pri la beleco de la pejzaĝo kaj ne kalkulas nur la transiritajn kilometrojn en la montaro "kun plej granda komforto".

(laŭ Ĉ.Klos tr. J.Chvosta)

UNESCO KAJ ESPERANTISTOJ

"MONDA KUNAGADO por eduko, scienco kaj kulturo" estas Internacia Unesko-asocio por esperantistoj fondita dum la 76-a UK 1991 en la norvega Bergen. Ĝi havas proksimume 250 anojn en pli ol 40 landoj. La ĉefa celo de MONDA KUNAGADO estas kontribui al la paca internacia kompreno en la mondo laŭ modelo de Unesko. Interesatoj pri membriĝo en MONDA KUNAGADO povas alpagi 10 nederlandajn gulde-

nojn (NLG) al la konto ĉe UEA mofo-1 aŭ oni povas peti senpagan aliĝon. Pluajn informojn, materialojn kaj aliĝilojn povas sendi kaj vere volonte sendos peranto en Ĉeĥio: **Roman Heřman, Pod koupalištěm 730, 293 06 Kosmonosy, tel. 710710-0891.**

ĈU ANKAŬ VI "UJUTNAS"?

La fama botanikisto-esperantisto d-ro Paul Neergaard siatempo bedaŭris, ke en la Esperanta versio de Andersen-fabeloj, tradukitaj de Zamenhof el la ne plej bona traduko germana, montriĝas relativa malriĉeco de Esperanta vortstoko. Manĉis al li precipe vorto por la dana "hyggelig" sumiganta la enhavojn de "korvarmo, intimo, senetikeco, senformaleco, hejmececo, agrablo, ĝojo". Tiun sumigon li trovis en la rusa "ujutnyj", kiu ŝajnis al li taŭga por esperantigo. En lastaj jaroj la vorto vere ekvivis en Kopenhago, kie oni ujutnas dum ĉiu klubkunveno, la vorto aperas en kantoj kaj gazetoj,

ĝi penetris eĉ en leterojn el Rusio, Francio, Tajvano kaj Sud-Ameriko. Do, se iu demandos vin, kiel vi ujutnas, ne terurigu, sed daŭrigu vian ujutnadon tute trankvile.

(laŭ la dana DEFA-bulteno)

ESPERANTO EN RADIO

La 6-an de januaro 1993 vespere la radio-stacio Vltava elsendis programon "Artefarita Lingvo", en kiu diskutis redaktoro kun esperantistoj Jaroslav Mařík, ing. Jan Pospíšil kaj lingvisto Sáva Heřman. Oni diskutis precipe pri la angla, esperanto kaj volapuko. D-ro Josef Kavka reagis per jenaj vortoj: "... tre interesa kaj altnivela diskuto pri planlingvoj. Mi gratulegas al ĉiuj partoprenintoj, sed precipe al la radiostacio Vultavo. Aparte ĝojigis min la favora sinteno al Esperanto. - Ja dum la ĵus pasinta Havel-erao mi renkontiĝadis pli eble kun stultaj eldiroj."

- jm -

AKTIVADO DE ORGANISMO PER MASAĜADO DE PLANDO laŭ Ludvík Eger: Ĉinaj sanigaj ekzercadoj

Ni aĉetu ĉiam nur guman akupresuran maton, ĉar plasta mato estas tre malmola por sentemaj homoj kaj kaŭzanta malagrablajn ĝenojn. Ĝi havas pli vastajn aplikojn, sed la baza estas ĉe materna aktivado de la organismo. La maton ni metas en la banĉambro antaŭ lavujo aŭ spegulo, kaj dum lavado, razado aŭ kombado ni paŝetas sur la mato samloke dum 3-5 minutoj.

Plua uzado: Maltrankvilo, troa laciĝo de laboro, sendormeco La maton ni metas en bankuvon kun 5 cm da varma akvo (35-40°C). Ni sidas sur rando de la bankuvo kaj malrapide samloke paŝetas per plandoj. Tion ni faras 20 min. Poste ni trankvile enlitiĝas kaj ripozas.

Laciĝo de la piedoj aŭ eĉ de la tuta korpo:

Ni bezonas du bankuvetojn kaj prefere du matojn. En la unua estas akvo varma (38-42°C) ĝis la mezo de la suroj, ni samloke paŝetas 1 min. En la dua estas akvo malvarma (10-15°C) ĝis la mezo de la suroj, ni paŝetas 30 s. Ni alternigas la banojn 4-10 foje. Poste ni frotas la piedojn ĝis sekigo kaj ruĝigo.

- ŝr -

KIEL PRIVIGLIGI LA LIBROMERKATON EN ESPERANTUJO

Bernard Golden

PLENDOJ KAJ PROPONDOJ

Lastatempe en la verdlingva gazetaro oni verŝis multe da inko kaj larmoj pri la malbona stato de la merkato de libroj en Esperanto, kaj pluraj eminentuloj kaj erudiciuloj inter niaj literaturistoj provis trovi rimedojn por kuraci la malsanon. Unu sugestas, ke oni pagu honorarion aŭ tantion al aŭtoroj, por instigi ilin verki pli altkvalitajn literaturajojn. Alia brile rezonas, ke ne okazas granda debito de Esperantlingvaj libroj, ĉar la prezoj estas tro altaj. Tria kulpigas kaj la poetojn, kiuj superproduktas, kaj la scienculojn, kies teknikaj kaj fakaj verkoj en la internacia lingvo malabundas. Eĉ troviĝas herezulo, kiu sentime vortumas la opinion, ke la belliteraturo ne estas grava, unuaranga faktoro hodiaŭ. Lia opinio, estas pli urĝe nuntempe ellabori Esperanto-politikon por sukcesi la agnoskon de Esperanto kiel la Internacia Lingvo. Supozeble, oni povas konkludi el tio, ke eĉ se niaj Muzinoj ne intence obstrukcas la vojon al tiu celo, ilia kontribuado apenaŭ rapidigas ties atingon.

LA MALBENO DE MEZKVALITO

Por fari objektivan aprenon pri la kvalito de originalaĵoj en esperanto, oni dekomence devas levi jenan tiklan demandon: Kiom da Esperantlingvaj verkistoj havas solidan reputacion pro altvaloraj verkoj en sia propra gepatra lingvo? Multaj? Pluraj? Aŭ ĉu ili estas nombrelaj per la fingroj de unu mano? Kial, do, svarmas tiom da mezkvalitaj verketoj de

versistoj kaj novelistoj sur niaj librobretoj? Kiu dubas tion, ne legu reklamojn de eldonejoj sed recenzojn verkitajn de seriozaj kritikistoj. Rilate la poezian ĝenron, mi riskas konjekti, ke la plimulto de niaj versfarantoj prenas plumon en la manon ĉefe por ludi per la lingvo, kaj ne por komuniki novajn konceptojn aŭ esprimi profundajn filozofiaĵojn. En aliaj vortoj, iu potenca, diletantisma egoismo pli ĝuste ol artisma kreiveco aŭ intelekta kapablo motivas la poezian sinpeladon. Tiurilate, mi demandas min, ĉu iu iam enketis por ekscii, ĉu Esperantosciantoj avide legas poeziaĵojn samproporcie al la gurdmaŝina produktado de tiaj verkoj?

MERKATESPLORO

Laŭ la ekonomia teoriado de unu el niaj elstaraj beletristoj, la vendad-problemoj estos solveblaj facile, se la eldonado kaj distribuado de Esperantaj publikigaĵoj estas starigitaj sur stabila komerca bazo fare de profesiulo kun negoca sperto. Efektive, plialtigo de la eldonkvanto de libroj rezultigos malaltigon de la prezoj de unuopaj ekzempleroj. Sed oni devas, kompreneble, ankaŭ disvendi tiujn librojn. Al kiuj? Kaj ĉu oni povas atendi dek jarojn, laŭ la takso de unu informinto, antaŭ ol sufiĉe da esperantistoj elpoŝigas la kontanton por kovri la kostojn de la presado? Ĉi-rilate venas alia sugesto: demandu la esperantistaron, kion ili deziras legi, kaj poste eldonu tiajn ĝenrojn kaj verkojn. Denove mi demandas, ĉu tio estas vere la solvo.

NELEGGKAPABLAJ ESPERANTISTOJ

Miaopinie, la ĉefa tubero en la afero estas la nuda kaj kruda fakto, ke multaj esperantistoj ne povoscias legi Esperanton! Ĉie en Esperantujo eblas konstati la priplorindan realon, ke la lingvoscio ĝenerale estas malaltnivela. Kial ekzistas tia morna situacio, se propagandistoj fiere fanfaronas, ke Esperanto estas facila lingvo, kiu estas lernebla multoble pli rapide ol iu ajn etna lingvo? Unue, la granda amaso da verdstelanoj studas la lingvon dum relative mallonga periodo, kutime nur dum la tempodaŭro, kiu sufiĉas por alproprigi la rudimentojn de la gramatiko kaj bazan vortprovizion. Tio ĉi ebligas partoprenon en kunvenoj kaj kongresoj, kie oni povas flue saluti kaj adiaŭi aliajn samsortanojn. Do, multaj esperantistoj kontentiĝas per supraĵa lernado kaj post la elementa kurso ili sentas nek emon nek bezonon studi plu. Sur la sama nivelo ili daŭre restas - kaj rustas. De tempo al tempo iu neologismo en la loka multobligita klaĉgazeto ekskuas ilin el ilia memkontenteco.

STIMULADO DE LEGEMAJ ESPERANTISTOJ

Kaj jen la diabla, neelirebla rezoncirclo: se oni ne legas kun facileco, la legado iĝas teda tasko. Sekve, ĉar oni ne kapablas kultivi bonajn legkutimojn, oni ne emas aĉeti librojn, eĉ pruntepreni ilin el biblioteko, aŭ aboni periodaĵojn. La solvo de tiu ĉi problemo estas urĝa, kaj oni devas ataki la stagnominacon multflanke. Grava ŝarĝo kuŝas sur la ŝultroj de estraro de la loka grupo, ĉar tro ofte kunvenprogramoj lule invitas ĉeest-

tantojn al pasiva "partopreno". La vera plago de multaj aranĝaĵoj estas la lumbilda programe-ro, kiu estas unu el la plej efikaj mensdormigiloj. Oni devas trovi rimedojn por aktivigi la klubanojn, okazigi vivantan uzadon de la lingvo kaj gustumigi la bonan literaturon. Alia tasko apartenas al aŭtoroj de lernolibroj, kiuj devas, ekde la unuaj lecionoj, provizi pli altkvalitajn legaĵojn anstataŭ la kutimaj banalaĵoj.

EL POPOLA ĈINIO DENOVE EN ĈEĤIO KAJ SLOVAKIO

Dank' al la firmao ESPERO, poŝtkesto 34, 696 62 Strážnice, tel. 0631/942 507 kun registri-lo, eblas ankaŭ en niaj landoj aboni la konatan luksan, enhavoriĉan revuon EL POPOLA ĈINIO kontraŭ 430 Kčs. Specimenan ekzempleron eblas ricevi kontraŭ antaŭpago de 10 Kčs.

- vlha -

SESIO DE AIS

okazis 14.-15.11.1992 en Praha, Pedagogia fakultato de KU, pri la temo "Lingvo-orientiga instruado" (LOI). Ĉeestis dudeko da fakuloj el kvin landoj, prelegis ĉefe d-ro Helmar Frank (Paderborn). La celo de la eksperimento estas elmontri kaj dokumenti la propedeŭtikan valoron de ILo por instruado de etnaj lingvoj.

La ĉeestantoj ricevis dulingvan broŝuron (23 p.), en ILo kaj en la ĉeĥa, de H. Frank, "Propedeŭtika Valoro de la Internacia Lingvo (ILo)" - eldonis kaj vendas firmao Kava-Pech (de Petro Chrdle), Dobřichovice.

jm



KASTELO HELFŠTÝN KAJ FORĜISTOJ

La kastelo Helfštýn, situanta en Moravio (proksime de la distrikta urbo Přerov), fondita en la 14-a jc. kaj multfoje rekonstruata de čeĥaj kaj germanaj nobelaj familioj, kiuj ĝin alterne posedis, apartenas al plej grandaj burgoj en Eŭropo kaj al plej bone konservitaj memoraĵoj en Ĉeĥa Respubliko.

Fine la kastelo servis kiel armea fortikaĵo, sed kiam la armeo ne plu bezonis ĝin, la aŭstra administracio en 1656 ordonis intence ĝin difekti, por ke ĝi fariĝu neloĝebla kaj ne povu en siaj muroj kaŝi taĉmentojn malamikajn kontraŭ la tiama reĝimo.

Nuntempe ligiĝas al la kastelo Helfštýn vidindaĵo rara en la tuta Eŭropo: internacia renkontiĝo de forĝistoj-artistoj, fama sub la nomo HEFAISTON. Artoforĝistoj ne nur el Ĉeĥio kaj Slovakio, sed ankaŭ ekzemple el Britio, Israelo, Hungario, Germanio kaj Aŭstrio ĉiujare prezentas sian majstrecon kaj virtuozecon antaŭ vizitantoj en la kastela forĝejo.

La plej bonaj verkoj premittaj de la faka jurio restas en la kastelo por ĉiam kiel ekspozitaĵo de riĉa ekspozicio de la forĝ-arto. Malgraŭ la alta valoro de la kolekto mankas tie specialaĵo: artverko de forĝisto-esperantisto.

Pro tio ni turnas nin al ĉiuj artoforĝistoj-esperantistoj en Eŭropo, Azio aŭ transmaraj landoj: ĉu vi deziras partopreni la renkontiĝon HEFAISTON en la kastelo Helfštýn en la venonta jaro kaj mezuri viajn fortojn kun aliaj majstroj de la ardanta fero? Ĉu vi volas per viaj ideoj transformitaj en metaln plastikajon alparoli la kastelajn vizitantojn kaj penigi ilin?

Se troviĝos tia forĝisto-esperantisto, li tuj skribu al la adreso: **Ĉeĥa Esperanto-**

-Asocio, sekcio de naturprotektantoj, Štefan Takáč, Hrdinů 1158, 783 91 Uničov, Ĉeĥa Respubliko.

-št-

NOVAJ POROKAZAJ POŝTAMPOJ RILATAS AL ESPERANTO

En la urbo Strážnice, distr. Hodonín, loka poŝtoŭficejo uzadis en decembro 1992 (14 /31) porokazan stampon en poŝta afrankmaŝino memore al Francisco Valdomiro Lorenz, aŭtoro de la unua ĉeĥa lernolibro de Esperanto.



Alia porokaza stampo estas preparata okaze de komuna kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Germana Esperanto-Asocio en Karlovy Vary (1993-05-28/30). Oni uzos ĝin por afrankmaŝino ekde februaro ĝis la fino de kongreso.

Aŭtoro de ambaŭ stampoj estas inĝ. arĥ. Karel Kuča kaj majstre gravuris ilin Karel Pavlíček. Interesiĝantoj povas skribi al: Esperanto, V. Hasala, p.k. 34, 696 62 Strážnice.

-vlha-



1993
CEA-GEA
KOMUNA
KONGRESO
● K. VARY

NOVÉ ZBOŽÍ VE SVAZOVÉ PRODEJNĚ :

Sklad.čís.: Název	cena Kčs
A 006 Odznak "Mi amas Esperanton".....	17,--
kotouč 37 mm, zavírací špendlík	
C 207 H.G.Frank: Propedeutická hodnota	
mezinárodního jazyka	15,--
C 201 Stomatologický terminář, brožura +	
software	288,-
C 202 Stomatologie - elektronický slovník	144,-
C 203 Hydraulický terminář, brožura + software.....	288,-
C 204 Aplikační program Termino 1 + Runtime	165,-
C 205 Demonstrační disketa ISO 6937	50,-
C 206 Mezinárodní ISO-kódy, názvy zemí apod.	65,-
C 125 Seppik: La tuta Esperanto	35,-
C 171 Baghy: Gramatika Demandaro	19,-
C 166 Amuza Legolibro en Esperanto	39,-
C 200 Štimec: Vojaĝo al disiĝo	30,-
C 132 Auld: Paŝoj al plena posedo	42,-

JEŠTĚ MOŽNO PŘEDPLATIT SI HEROLDO DE ESPERANTO NA ROK 1993!!!

Pokud máte zájem o letošní předplatné na Heroldo de Esperanto, máte možnost. Předplatné na celý ročník (16 čísel) činí 350 Kčs. Z celkového počtu nám "přídělených" výtisků je ještě několik "volných".

Objednávky předplatného na Heroldo de Esperanto i na veškeré zboží v prodejné svazu posílejte na adresu :

Český esperantský svaz
expedice
 Jiřská 10
 110 00 Praha
 tel. 02-220 262

Těšíme se na Vaše objednávky !

Omlouváme se všem členům, kteří zaplatili svůj členský příspěvek pro rok 1993 a doposud nemají členské známky. Členské známky, jejichž tisk se poněkud opozdil, prozatím nemáme k dispozici. Váš příspěvek je však registrován a zasíláme Vám i veškeré materiály dle toho, v jaké kategorii byl příspěvek zaplacen. Známky s Vaším výpisem z členské kartotéky Vám zašleme okamžitě, jakmile je obdržíme. Děkujeme Vám za pochopení a trpělivost.

Lucie Karešová

Dary na ediční fond A.M. :

Příspěvky členů kroužku v Třinci:	Anna Sniegoňová	50,-	Kčs;
	Henryk Mendrok	50,-	Kčs
	Marie Mládková	50,-	Kčs
	Heřma Ovčaričková	50,-	Kčs
	Markéta Klimšová	50,-	Kčs
	Hilda Morcinková	100,-	Kčs
	Anna Milatová	100,-	Kčs

Český esperantský svaz
110 00 Praha 1, Jilská 10
* * * STARTO * * *

Nepravidelný věstník Českého esperantského svazu. Vychází 6x ročně. Je určen členům svazu. Odpovědný redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno. Administrátor: Karel Daněk, box 425, 660 25 Brno 2. Opravy adres zasílejte na adresu svazu.

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Aperas 6-foje jare. Respondeca redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno. Administratoro: Karel Daněk, box 425, 660 25 Brno 2, Ĉeĥa Respubliko. Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia asocio. Abonprezo: 14 guldenoj.

NOVINOVÁ ZÁSILKA

Povoleno JmŘS Brno:
č.j. P/3-8847/91ze dne 28.8.1991
Podávací pošta:
664 03 Podolí u Brna